Tagiĝo

MONATA INFORM-BULTENO DE
ESPERANTO-ASOCIO DE BRASĪLIA
Edifício Goiás, Sala 603 - tel. 225-4761
Caixa Postal 04-0406 - 70000 - BRASĪLIA

JOSÉ CARLOS GONÇ. VIEIRA
SQS - 305 - F - 402
70.352 - BRASĪLIA - DF

A P R I L O 1980

## ESPERANTO MOVADO EN BRASĪLIA RENOVIĜAS KAJ PLIVIGLIĜAS

Dum la jaro 1979 okazis vera renoviĝo en la kadro de la anaro de EAB. Ĝia nombro multe kreskis en tiu fruktodona jaro. La plejmulto el la 25 novaj anoj estas junuloj malpli ol 35 jaraĝaj. El tiuj estas 3 kiuj jam partoprenas la estraron de nia Asocio, kies prezidanto estas ankaŭ junulo 32 jaraĝa. Per tiuj novaj kaj viglaj fortoj ni ja bone laboros por la 66a Universala Kongresso de Esperanto, okazonta en julio/aŭgusto, 1981, en Brasília

## ESPERANTO KLUBO EN TAGUATINGA - ALVOKO

Nia samideano GIVANILDO RAMOS COSTA sin proponas esti deirpunkto por starigo de Esperanto-Klubo en Taguatinga. Li jam eklaboras tiucele kontaktante la esperantistojn de tiu urbo. Vi esperantisto kaj simpatianto de Esperanto loĝanta en Taguatinga estas alvokata kontakti nian samideanon, kies adreso estas:

GIVANILDO RAMOS COSTA: QNM 36 Conj S Casa 21 - CEP 72000 - Taguatinga - DF.

En Taguatinga loĝas ankaŭ la jenaj samideanoj:
Alípio Cardoso de Lima - QNE 16 Lote 11
Arcelino Antonio da Silveira - QNA 40 Casa 10 - Tel 561-3365 e 225-1580/255
Estelita Silveira Mendes - QNA 6 Lote 8
Eurípedes Nascimento - FREL
Gildásio Macedo - QND 2 Lote 4
Ivete Cavalcante Correia - QNB 15 Casa 15 - Tel 561-3425
Ludimar Azevedo da Silva - QNL 01 Bloco E Casa 14 - Tel 562-8904
Myrthilla Soares Guimarães - QNB 17 Lote 15
Neide Barroso - QNF 8 Casa 38 - Tel 5614395

## KOTIZO POR LA JARO 1980

Kiel anoncis la marta numero de Tagiĝo, la jara kotizo de nia Asocio estas fiksita je Cr$ 400,00. Nia kasisto jam estas preta por ricevi ĝin kaj dankas la pretecon de jenaj samideanoj kiuj jam kontribuis:

1. Carlos A. Siqueira Cunha
2. Enivaldo Alves Silva
3. Giuseppe Grattapaglia
4. Igor Valevski
5. Ines Maria de Sá Araújo
6. José Carlos G. Vieira
7. Josias Ferreira Barboza
8. Luiz Maurício de Sá Araújo
9. Maria Ester Pinto de Souza
10. Maria Lúcia Rego Silva
11. Mauro Gomes Azevedo
12. Neima Cardoso Adôrno
13. Robin de Mello e Souza
14. Sebastião Monteiro
15. Ursula Grattapaglia

## B E J O INFORMAS:

La 2-a Brazila Esperantista Tendaro okazos en Cachoeira da Fumaça (40 km de Lavras-MG), de la 26a ĝis la 31-a de Januaro 1981. La Aliĝ-kotizo estas nur Cr$ 100,00. Pli detalajn informojn donas:

S-ro Luiz Teixeira da Silva
Caixa Postal 53
37200 - LAVRAS - MG


## B E J O DANKAS:

al siaj P A T R O N O J (S-ino BALBINA FERREIRA - RJ kaj S-ro JOSÉ DIAS PINTO - SP), por la financahelpo kaj precipe por la moral-apogo kaj frata kunlaboro! ! !

PROGRAMO POR LA VENONTAJ SABATOJ

- 19an de Aprilo: Konversacia Rondo
- 26an de Aprilo: Prelego de Giuseppe Grattapaglia: "LA SIGNIFO DE UNIVERSALA KONGRESSO DE ESPERANTO EN NIA ĈEFURBO".
- 3an de Majo: Homaĝo al la membroj, kiuj festos dum majo siajn naskiĝdatrevenojn. La feliĉuloj estas: José F. da Cruz, Celso de Carvalho, Ivete C. Correa, Maurício P. Vasquez, Waldir A. Silvestre kaj João Chaves Lima.
- 10an de Majo: Gazetara Vespero
- 17an de Majo: Konversacia Rondo
- 24an de Majo: Konversacia Rondo

VIZITO AL UNUIĜINTAJ NACIOJ KAJ NOV-JORKA OFICEJO DE UEA



Nia samideanino URSULA GRATTAPAGLIA vizitis la 31-an de marto ĉi jaran, la novan oficejon de Universala Esperanto Asocio (UEA) en Nov-Jorko.

Tiu nova oficejo de UEA stariĝas en United Nations Plaza 777, 7th Floor, antaŭ la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj (UN) kaj celas fari kampanjon ĉe la 7000 funkciuloj kaj 142 delegacioj de UN por ke ili adoptu la esperantistan solvon por la lingva problemo skuanta tiun internacian instancon, kiu jam ricevas la kromnomon "Babela Turo".

Akompanita de S-ino JACKIE McLOON, estrino de tiu UEA oficejo, Ursula Grattapaglia trairis diversajn internaciajn represent-oficejojn havantajn sidejon en la "Vitra Palaco" kaj kontaktis S-ron ROBERT MULLER, Eks-Sekretario de Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN, kiun ŝi persone invitis ĉeesti en la 66a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Brasília, de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1981. La ĉeesto de S-ro ROBERT MULLER alportus grandan prestiĝon por la 66a UK, kiu jam montras perspektivojn esti ĝi unu el la plej gravaj el la lastaj E kongresoj.

JAM EBLAS ALIĜI LA 66-AN UNIVERSALAN KONGRESON!

Por tre limigita periodo, ĝis komence de aŭgusto, la brazilaj esperantistoj ĝuos tre favorajn kondiĉojn por aliĝi nian Universalan Kongreson, kiu okazos de la 25a de Julio ĝis la 1-a de Aŭgusto 81 en la Kongresa Centro de Brasília. La kotizo, por individuaj membroj de UEA, sumas nuntempe je Cr$ 1.600,00, kiun vi povos pagi en nia sidejo aŭ ĉe la Loka Kongreso Komitato en Ed. Jockey Club, Sala 103, matene. FRUA ALIĜO ESTOS KONVENA POR VI KAJ POR LA PRESTIĜO DE NIA ESPERANTO MOVADO!

TUT-AMERIKA ESPERANTO KONGRESO EN SAN LUIS (ARGENTINO)

La lastaj informoj el San Luis, kie de la 12a ĝis la 15-a de julio 80 okazos la Tut-Amerika Esperanto Kongreso, estas tre kuraĝigaj. La manifestacio ricevis plenan apogon de la lokaj aŭtoritatoj, kiuj disponigos plurajn faciligojn al la partoprenantoj. Estos en la programo tri muzik-festivaloj, ekskursoj, prelegoj kaj organizaj junvenoj. El Brasília veturos al San Luis grupeto de esperantistoj, kies celo estos ankaŭ varbi por nia Universala Kongreso. Se vi deziras partopreni, aliĝu tuj la Kongreson sendante 30 Usonaj dolarojn al la Organiza Komitato ĉe S-ino ESTELA PEDERNERA DE ZUPO

1-A TUT-AMERIKO ESPERANTO KONGRESO, CHACABUCO 405 - 5700
SAN LUIS - ARGENTINO